

Okdek jaroj de esperanta vivo, 5-a parto
La dua jaro de esperanto
Claude Gacond, 175-a radioprelego, 1967.02.15 & 1967.02.18

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Zamenhof konstatis la danĝeron de la adorado al la herooj. Li sciis, ke homoj mallonge akceptas blinde obei al la decidoj de alia homo. Necese alvenas la tago, kiam la aŭtoritato de tiu homo super aliaj homoj estas kritikata. Tiam estas danĝero, ke la malapero de la homo, kiu personigis la ne plu akceptatan aŭtoritaton, forbalaas kun li la valorojn konservindajn.

A.- Aŭtoritato trudita el ekstero rapide estas sentata kiel ĝena. Kaj la homo, kiu personigas tiun aŭtoritaton fariĝas la ĝenanto.

Cl.- En la dua jaro de la esperanta erao multaj adeptoj de nia lingvo senpacience atendis de Zamenhof, ke li kiel eble plej rapide eldonu librojn, gazeton kaj vortarojn. Ni komprenas ilin. Ili ne povis senĉese relegi la saman broŝuron.

A.- Al tiuj avidemuloj je legaĵo Zamenhof severe respondas:

Cl.- *« Ne malfacile estus por mi kontentigi tiujn ĉi amikojn ; sed ili ne forgesu, ke tio ĉi estus danĝera por la afero mem, kiu estas tiel grava, ke estus ne pardoneble faradi laŭ la propra decido de unu homo. »*

A.- Kaj li aldonas:

Cl.- *« Multaj kredeble estos malkontentaj, ke mi ne volas eldoni persone plenan aŭtoritatan vortaron, kiun ĉiuj devas obei. »*

A.- Kaj jen severa juĝo :

Cl.- *« La amaso amas, ke oni donu al ĝi leĝojn, ke oni donu al ĝi ne bonan, sed jam tute pretan, - kaj la vojon, kiun mi proponas, multaj nomos tro malrapida. »*

A.- Zamenhof poste montras, ke li elektis la malfacilan vojon, tio ne pro persona plaĉo, sed ĉar la viva fenomeno tion postulas. Aŭdu :

Cl.- *« Se mi ne eldonas mem vortarojn pli plenajn, sed lasas ilian kreadon al la publiko, mi ĝin faras ne pro maldiligento ; sufiĉe plena vortaro jam estas preta ĉe mi, kaj mi povus eldoni ĝin eĉ tuj, kaj se ĝi eĉ ne estus preta, la leganto komprenos, ke ĝi estas tute ne malfacila por mi, krei ĉiutage certan nombron da vortoj kaj eldonadi paŝo post paŝo vortarojn ĉiam pli plenajn. Por mi persone estus kompreneble multe pli oportune teni la sorton de l' lingvo internacia en miaj manoj. Tial, mi esperas, la leganto komprenos, ke kreinte la fundamenton de l' lingvo mi nun deponas de mi tutan aŭtoritaton nur tial, ke mi profunde kredas, ke tion postulas la intereso de l' afero. La tempo, mi esperas, montros, ke mi ne eraris. »*

A.- Tamen Zamenhof scias, ke socio vivas nur pro ekzisto de aŭtoritato. Socio povus kreiĝi sub lia aŭtoritato. Sed tian socion li ne volas. Li volas socion kapabla aŭtonome evolui. Fonton al aŭtoritato ĝi devas posedi en si mem.

Cl.- Tiu aŭtoritato ekster lia persono, kiu ligu la adeptojn de la Lingvo internacia, estu komune akceptita Fundamento. Aŭdu kiel Zamenhof esprimas sin tiurilate en la *Aldono al la Dua Libro* :

A.- *« Por ke lingvo povu regule, unuforme kaj unuvoje progresadi malgraŭ la disĵetita laboro de malsamaj personoj en malsamaj lokoj de la tuta mondo, oni devas krei komunan fundamenton, sur kiu ĉiuj povas labori.*

Okdek jaroj de esperanta vivo, 5-a parto
La dua jaro de esperanto
Claude Gacond, 175-a radioprelego, 1967.02.15 & 1967.02.18

Cl.- *Tia komuna fundamento por la Lingvo internacia devas esti mia unua broŝuro, kiu havas en si la tutan gramatikon de la lingvo kaj sufiĉe grandan nombron da vortoj.*

A.- *Tio ĉi estas la unua kaj lasta persona vorto en la afero de l' lingvo internacia.*

Cl.- *Ĉio cetera devas esti kreata de la homa societo kaj de la vivo, tiel kiel ni vidas en ĉiuj vivantaj lingvoj.*

A.- *Ĉiu, kiu ellernis la diritan **fundamenton**, povas kuraĝe diri, ke li konas la lingvon internacian tute, ke li konas ĝin ne malpli bone ol la aŭtoro aŭ ol iu alia.*

Cl.- *Ĉar en ĉio, kio en la dirita broŝuro ne estas trovata, kompetenta devas esti de nun ne la aŭtoro aŭ ia alia persono, - la solaj kompetentaj nun devas esti talento, logiko kaj la leĝoj kreitaj de la plej granda parto de la verkantoj kaj parolantoj. »*

A.- *Tiuj diroj de Zamenhof, kiujn ni ĵus legis, estas dokumento, kiu certe influis la tutan evoluon de la lingvo kaj movado. Se *Fundamento* estis nur akceptita en 1905 dum la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo-sur-Maro, la ideon mem akceptis la esperantistoj jam antaŭe, pro la diroj de Zamenhof en tiu *Aldono al la Dua Libro*. Sed por Zamenhof tiu Fundamento nur povis signi etapon en la disvolviĝo de la lingvo. Alportante unuecon ĝi ebligis rapidan riĉiĝon de la lingvo. Sed poste ĝi ne plu estos bezono. Aŭdu :*

Cl.- *« Kiam la lingvo sufiĉe fortiĝos kaj ĝia literaturo sufiĉe vastiĝos, tiam ankaŭ tio, kio estas en mia unua broŝuro, devos perdi ĉian signifon kaj sole kompetentaj tiam devos esti la leĝoj ellaboritaj de la plejmulto. Per unu vorto – la lingvo internacia devas vivi, kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiaj estis ellaborataj ĉiuj vivaj lingvoj, kaj tiu formo, kiun mi donis al ĝi, tiu gramatiko kaj vortaro, kiun mi prezentis, devas esti sole fundamento, sur kiu estas ellaborata la efektiva lingvo internacia de l' estonteco. »*

A.- *Jen laŭ li, kiel riĉiĝos la lingvo :*

Cl.- *« Se ia vorto ne estas trovata en la vortaro, tiam ĉiu povas krei ĝin laŭ sia persona plaĉo ; tiel ankaŭ se naskiĝu ia demando stilistika aŭ eĉ gramatika ne decidita en mia unua broŝuro, - ĉiu povas ĝin decidi laŭ sia juĝo ; kaj se vi volas scii, ĉu vi bone decidis tiun demandon, turnu vin ne al mi, sed rigardu, kiel tiun demandon decidas la plejmulto de l' verkantoj. »*

A.- *Pri liaj propraj verkoj li anoncas :*

Cl.- *« La verkoj, kiujn mi eldonos persone, ne devas havi pli da kompetenteco ol la verkoj de ĉiu alia. »*

A.- *Tiam aliaj adeptoj povos sin riski mem eldoni verkojn. Ili scias, ke doktoro Zamenhof atendas ilian kontribuon. Vera konkurso al verkado malfermiĝis. Kaj nun la literaturo forgesigas la *Unuan Libron* kaj eĉ la *Fundamenton* oficiale akceptitan en la dekokaj jaroj de la esperanta erao.*

Cl.- *Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !*

-oOo-